

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por 1/2 jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/32 de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. e.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie).

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 2.

Nurnbergo, Februaro 1891.

Jaro II.

Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj de Leibnitz ĝis la nuna tempo.

Publika parolado, havita en la Nurnberga klubo de instruistoj la 11-an de Novembro 1884 de L. Einstein.

(El la „Bayerische Lehrer-Zeitung“ No. 11 kaj 12 1885.)

Jam de 200 jaroj kun rilate malgrandaj interrompoj estis farataj provoj krei lingvon internacian, kaj la deziro de komuna lingvo por ĉiuj homoj estis esprimita eĉ jam antaŭ pli ol 2000 jaroj de la profeto Zefaniah. Tiu ĉi deziro havas ankaŭ tre gravan fundamenton; ĉar de ĉiam la babilona konfuzo de lingvoj estis granda malhelpo al la spirita komunikigo inter la nacioj. En nia tempo, kiam la interkomunikigo de la popoloj per la telegrafoj, vaporŝipoj kaj fervojoj grandigis en maniero neniam supozita, ankaŭ la ellernado de la lingvoj de ĉiuj tiuj ĉi popoloj fariĝis bezono de la bone edukitaj kaj precipe de la komercistoj; sed tiu ĉi lernado estas tiel malfacila kaj tempon deprenanta, ke ĝi pleje devas esti farata kun perdo por la aliaj regionoj de scienco, kaj tial la postulado de unu lingvo komuna, akceptita de ĉiuj edukitaj homoj, anstataŭanta ĉiujn aliajn fremdajn lingvojn, montras sin des pli pravigita. Oni povus tial atendi, ke tia elpenso estos de la homaro akceptita kun la plej granda plezuro! Sed tiu ĉi ideo entute en la publiko ne estas tiel hejme, kiel ĝi devus esti, kontraŭe ni renkontas, eĉ en sferoj, kie ni devus ĝin atendi la plej malmulte, antaŭ ĉio la antaŭjuĝon ke enkonduki unu lingvon por ĉiuj homoj estas simple afero ne ebla. Tamen la argumentoj, per kiuj oni kontraŭ tio ĉi batalas, estas aluzebaj nur por lingvoj naturaj kaj neniel por lingvo arta, kiun oni devas rigardi nur kiel arto laŭ la modeloj de la lingvoj naturaj kreitan „elekton de la plej bona“. Cetero mi trovis, ke vera kompreno de tiu ĉi objekto nur tiam povas esti atingita kun utilo, kiam ni antaŭe okupos nin iom je la preparaj laboroj, kiuj antaŭiris al la nuna sistemo de lingvo tutmonda.

Tio ĉi ne estas al mi eble doni detalan priskribon de tiuj ĉi ĉirkaŭ 60 provoj; estas sufiĉe, se ni nur enkomune vidos, kio ĉio estis farita en tiu ĉi rilato, kaj kiajn rimedojn oni ĉiufoje volis uzi, por ĉiujn homojn lingve unuigi. Dume el ĉiuj tiuj ĉi penoj montriĝas la instruo, kiu ankaŭ en aliaj aferoj pruvigas, ke la grandajn verojn oni atingas ne per tre malgranda kosto, sed ke al tio, kion oni fine konfesas kiel „mirinde simpla“, oni proksimiĝis ĉiam per malrapidaj kaj malfacilaj flankaj vojoj nur iom post iom kaj paŝo post paŝo.

Oni vidas ordinare en Leibnitz la patron de la „ideo de lingvo tutmonda“; tiu ĉi publikigis sian ideon pri la

„Pazigrafio aŭ la arto fari sin komprenebla per komunaj skribaj signoj al ĉiuj nacioj de la tero, en kiaj ajn malegalaj lingvoj ili parolas, se ili nur konas tiujn ĉi komunajn signojn“ la unuan fojon en la jaro 1666 en latina disertacio (Dissertatio de arte combinatoria, Lipsiae 1666). Tiu ĉi ideo ankaŭ okupis la grandan pensanton ĝis la fino de lia vivo, kvankam li en tio ĉi venis al nenio ekster senfruktaj iniciatoj. Tamen oni povas jam la hieroglifojn rigardi kiel speco de pazigrafio, kiel ankaŭ la finajn signojn de skribado, kiujn uzas pli ol triono de la tuta homaro, malgraŭ iliaj preskaŭ nevenkeblaj malfacilaĵoj. Ĉar tiu ĉi ideo skribado, konsistanta el ĉirkaŭ 40 000 signoj, en kiu per unu komuna simbola signo estas esprimita tiu sama penso aŭ komprenajo, kiu, estante elparolata, en ĉiu lingvo sonus alie, povas tial esti legata en ĉiu lingvo, kaj la Ĥino tial ankaŭ legas siajn skribajn signojn ĉiam en sia dialekto, kaj la aliaj popoloj de Azio legas tiujn samajn signojn en ilia lingvo. Tiuj ĉi popoloj reciproke sin tiel ne komprenas per sia lingvo, sed komprenas sin per sia skribado, oni povus diri per la Azia pazigrafio*).

Tiaj kredeble estis la konsideroj, kiuj jam en la jaro 1668 igis la episkopon John Wilkins** eldoni sian grandozan pazigrafian provon, kiun prezentas al ni en bonega maniero Max Müller en la 2a volumo de siaj „Lekcioj pri la scienco de la lingvo“, el kiuj ni vidas, ke tie la ideoj kun siaj signoj estis orditaj laŭ specoj kaj dividitaj en klasojn, tiel ke de la komuna oni venadis al la aparta kaj de tie ĉi per ĉiam pli precizaj specialigadoj oni venadis fine al la plej speciala, kion oni volis esprimi en tia maniero.

Sed jam Leibnitz esprimas sin malfavore pri ĝi pro la multego da signoj kaj pro la malfacileco de ilia uzado por la intencita celo, kaj Max Müller mem montras al ni, kiel Wilkins fine, kvazaŭ kondukita de natura instinkto, venis al la vera, nome al „lingvo vorta“, kaj tiun ĉi vojon oni devus nur iri plu, por ŝpari al la h maro ducentjaran vanan penadon kun fantomo pazigrafia.

Sed kiel eĉ tia granda pensanto, kiel Leibnitz, sin movadis ankoraŭ en mallumaj antaŭsentadoj, oni vidas el tio, ke li ankoraŭ eĉ ne povis klare sin esprimi pri sia ideo de lingvo tutmonda; ĉar li diris pri la laboroj de Wilkins kaj de Dalgarno, ke la ĉefa afero, kiu tie ĉi estas bezona, la eltrovo de komunaj signoj por ĉiu objekto kaj ĉiu ideo, al ili ankoraŭ ne prosperis. Tiaj signoj laŭ lia opinio devis

*) V. D-ro Albert Wild: „Ueber Geschichte der Pasigraphie und ihre Fortschritte in der Neuzeit“. München 1864. (Aparta represo el la „Chronik der Gegenwart“.)

**) John Wilkins, An Essay towards a real character and philosophical language, 1668.

aŭtoro en Londono) ni havas nenion pli por noti. Por tio la plej novaj pazigrafistoj, pri kiuj ni nun parolos, nome: barono de Gablenz, Moses Paic, Don Sinibaldo de Mas kaj Anton Bachmaier, kiel ankaŭ Albert Walter, — staras pli alte ol iliaj antaŭirantoj aŭ en rilato de la konstruo, aŭ en rilato de facileco de la metodo.

La konstruo de la „Gablenzographia kaj Gablenzolahia“ de barono de Gablenz estas grandioza. Antaŭ ĉio li penis per aparta alfabeto laŭ 33 diversaj lingvoj en tiom same da ŝlosiloj solvi la problemon por la mondo lingvista skribadi tiel, kiel oni parolas. Li verkis gramatikon kaj vortaron, kiu pleje konsistas el vortoj unusilabaj. Sed kiel ajn bonege lia laboro estus, tre granda estas la malfacileco ellerni la 33 kaprompantajn ŝlosilojn. Al tie ĉi li tamen ne turnis atenton, ke la popoloj orient-Aziaj ne tre facile povas elparoladi la eŭropajn konsonantojn, nome la „r“, kiun li precipe multe uzas en siaj nomoj de nombroj (ra 1, re 2, ri 3, ro 4, ru 5). Kvankam la provoj de la pazigrafio de Gablenz por la praktika vivo ne taŭgas, li tamen montris, ke li bone konas la spiriton de la lingva scienco. En la jaro 1863 unutempe kun la proponoj de Grimm en Konstantinopolo aperis le verko de Don Sinibaldo de Mas, pri kiu ankaŭ estas iom parolite en la jam diritaj lekcionoj de Max Müller; ĝi aperis unutempe en Londono, Parizo kaj Lejpeigo kaj meritas atenton pro sia sistemo. Sed jam la difino, kiun li donas al ni pri ideografio: „L'idéographie est l'art d'écrire avec des signes qui représentent des idées et non avec des mots (sons) d'une langue quelconque“ ankoraŭ unu fojon montras, ke oni ĉiam ankoraŭ sin movadis sur la malvera vojo, kiu ĝis nun ne kondukis al la celo kaj ankaŭ neniam al ĝi kondukos. Elirante el la penso, ke la signoj de nombroj en la aritmetiko kaj algebro por tiuj popoloj, kiuj ilin uzas, estas nenio alia ol signoj ideografiaj, li penas elmontri, ke 500 milionoj da homoj, la Japanoj, Kofinĥinanoj, Tonkinanoj sin komprenas reciproke nur per unu sama skribado kaj uzas ĝin ĉiutage. Kaj kio ĝi estas alia ol signoj ideografiaj? Ĉu oni tiel povos ankoraŭ dubi la eblecon de tiu ĉi sistemo? Ĉu ni estus nekapablaj fari tion, kion faras la Azianoj, kiam ni ja kredas, ke ni staras multe pli alte ol ili? — La eblecon de la uzado ankaŭ ni ne dubas, sed ni ankaŭ ne dubas la malfacilecon de la enkondukado. La Ĥinoj laboru multajn jarojn super la lernado de sia skriba lingvo kun ĝiaj 40000 diversaj signoj — ni okcidentuloj jam de antaŭe havas nian hereditan de la feniko-hebreoj fonetikan skribadon alfabetan, kiu donas al ni la eblon el 23 literoj formi multajn milionojn da sonoj, kiuj vere ne povas esti nomataj vortoj, se kun ili ne estas ligataj difinitaj ideoj (komprenajoj). Sed el tio ĉi almenaŭ sekvas, ke ni povas krei al ni neniam pli riĉajn kaj pli praktikajn reprezentantojn por la grandioza diverseco de niaj ideoj, ol la vortojn de lingvo, kiuj ĉiuj estas kunmetitaj nur el malmultaj sonoj fundamentaj. Kaj ni devus nun ree returni al la senmovaj egiptaj aŭ ĥinaj signoj figuraj, kiuj estas fonditaj ankoraŭ sur la una tempa senta pririgardado kaj nur kun grandaj malfacilaĵoj permesas la prezentadon de abstraktaĵo! — Don Sinibaldo de Mas prenas por ĉiu „ideo“ unu signon, pruntitan el la muzika nota sistemo, nur kun la diferenco, ke li donas ne efektivajn notojn en ĉiuj iliaj nuancoj. La signon fundamentan formas noto kvarona, kaj laŭ tio, ĉu ĝi staras sur tiu aŭ alia linio, ĝi ŝanĝas sian signifon kiel substantivo, verbo, adjektivo k. c., kaj en simila maniero estas esprimataj ĉiuj formoj de la gramatiko. Kiel ajn facila tiu ĉi sistemo ŝajnas je l' unua rigardo, tamen tre baldaŭ montriĝas, ke la signoj por universala uzado estas tro komplikitaj.

Unu jaron poste Moses Paic, Serbo el Zemlin, publikigis pazilalion kaj pazigrafion*). Li uzis sole ciferojn, por esprimi

ĉiujn vortojn laŭ iliaj elementaj ideoj, tiel ke difinita vorto aperas ĉiam esprimata per difinita cifero. Tiel li uzas la nombrajn signojn de 1 ĝis 999 por ĉiuj gramatikaj fleksioj; la nombroj komencante de 1000 estas la pazigrafiaj signoj de ideoj. La apudaj komprenajoj de komuna ideo, la vortaj aliformaĵoj kaj devenaĵoj estas formataj per aldonado de pliaj nombroj al la nombroj de la ideoj per signoj de aldonado aŭ deprenado. Tiel ekzemple 3243 signifas la komunan ideon de aĉetado, kaj tiam $3243 + 10 =$ aĉetanto, $3243 + 13 =$ la aĉetanto, $3243 + 101 =$ la aĉetantoj k. c. El sia pazigrafio M. Paic faras pazilalion per tio, ke li por la apartaj nombroj metas literojn kaj por „+“ — „m“, por „—“ — „n“; ekzemple: $3243 + 10 =$ aĉetanto = „fegimano“, $3243 + 20 =$ aĉetantino = „fegimeno“, $3243 + 40 =$ aĉeto = „fegimono“ k. c. k. c.

Oni tiel vidas, ke ankaŭ Paic fine en simila maniero kiel Wilkins venus al la ĝusta, nome al skribado kaj lingvo sona, kvankam Wilkins tuj en la komenco laboris kun literoj, dum Paic kun ciferoj. Li ankaŭ pensis, ke por la ordinaraĵoj aferoj de la vivo estas sufiĉa la ellernado de 1000 signoj de ideoj, kiuj kun la plej granda facileco per helpo de la devenigitaj apudaj ideoj povas esti alkondukitaj al 10000. Sed jam D-ro Wild rimarkis, ke tiu ĉi sistemo postulas tro grandan pripensadon por povi esti enkondukitaj en la ordinaran interkomunikigon kun malproksimaj popoloj. Li opiniis ankaŭ, ke se la pazigrafio estus enkondukebla ĉe la Aziaj popoloj, oni devus preni por fundamento ne la ellaboritajn lingvojn Eŭropajn, sed ni devus por tio ĉi krei pazigrafion multe pli facilan, ol ĉe la ĥina; kaj apogante sin sur tiun ĉi principon, la lasta partiano de la ideo pazigrafia, Anton Bachmaier en Munĥeno, ĉefo de unu tiea granda komerca firma, jam en la jaro 1852 konstruis novan sistemon de pazigrafio, kiu en komparo kun la antaŭe nomitaj distingas sin per ekstreme simpleco.

Bachmaier ankaŭ fondis sian sistemon sur la signoj de la nombroj, ĉar ĉiuj komercaj popoloj posedas la sistemon de la 10 signoj de nombroj, kvankam iliaj formoj eĉ estas maldegalaj. Ankaŭ tiuj ĉi signoj povas esti skribataj laŭ ĉiuj direktoj, ne sole horizontale de maldekstre al dekstre, kiel ĉe la Eŭropanoj, sed ankaŭ de dekstre al maldekstre, kiel ĉe la Mahometanoj, aŭ de supre al malsupre, kiel ĉe la Orientazianoj, kaj al tio ĉi ili estas facile prezentablaj per skribado, presado kaj telegrafo. Bachmaier esprimas ĉiun komprenadon per nombro, ne uzas difinitan artikolon, sed por la artikolo nedifinita la nombron 1, kaj signas la multenombrojn per substreko de la nombro de la ideo. La substantivoj estas sen sekso kaj deklinacio. La gradoj de komparo estas distingitaj per unu aŭ du punktoj metitaj super la nombro de l' ideo, la nombromoj fundamentaj per supre metitaj, la nombromoj ordaj per malsupre metitaj punktoj. La verbo estas uzata nur en la modo nedifinita (infinitivo), la estonta tempo estas esprimata per superstreko, la tempo pasinta per trastroko de la nombro de l' ideo k. c. La plej konataj nomoj propraj kaj geografiaj ricevis en la vortaroj apartajn nombrojn. Bachmaier lasis jam en 18 lingvoj prepari provajn ekzemplerojn de tiaj vortaroj, super kiuj laboris la konata lingvisto profesoro Ignatz Gaugengigl kaj la privata instruitulo Wilh. Stephanus. Al tio ĉi formiĝis en Munĥeno centra societo por pazigrafio, al kiu apartenis unuaklasaj instruituloj, kiel la germana Mezzofanti, Pf. Richter, kiu paroladis en 34 lingvoj, Pf. Lauth, la glora egiptologo, D-ro Wild, la bonega naciekonomiisto kaj statistikisto kaj multaj aliaj, kiel ankaŭ la barono von Gablenz en Dreseno, Don Sinibaldo de Mas kaj Paic estis honoraj membroj de ĝi.

Malgraŭ ke la sistemo de Bachmaier estis ekstreme simpla, uzante nur 9 komunajn kaj 6 apartajn signojn, kaj eĉ jam turnis sur sin la okulojn de la registaroj, tiel ke jam estis intencita universala kongreso, kiu devis havi lokon en Parizo, tamen la entrepreno ree perdiĝis sen rezultato. Kaj

*) Pli detale v. en la verko de D-ro Wild.

kial? — Se ĝin ankaŭ sonoraj kaŭzoj, la elsekiĝo de materialaj fontoj, antaŭ ĉio pereigis, tamen la veran kaŭzon oni devas serĉi pli profunde, ĝi kuŝas en la sistemo mem. Ĝi nome estis konstruita sur sablo, kiel la sistemoj de ĉiuj antaŭirantoj de 200 jaroj, ĉar la plej simplan kaj plej facilan oni la plej malfacile trovas.

Tamen oni ne devas pensi, ke sistemo en tiel alta grado simpligita, kiel la sistemo de Bachmaier, kvankam ĝi ne portis en si la fundamenton por lingvo tutmonda, foriris el la mondo, alportinte nenian utilon. Bachmaier diris mem en la antaŭparolo al siaj pazigrafiaj vortaroj: „Estas kompreneble, ke tiu ĉi skriba maniero de komunikigo neniam estos egala al la bonaĵoj de lingvo; tamen por la komunikigo kun tiuj, kies lingvon oni ne komprenas (kiu homo komprenas ĉiujn lingvojn!) ĝi estas ekstreme grava helpo“. Efektive tiu ĉi sistemo por mallongaj notoj komercaj, por sciigoj de gazetoj kaj precipe por telegramoj al ĉiuj landoj de l' mondo montriĝis uzebla. La „Sistemo ĉifrada kaj telegrafada de A. Walter en Winterthur“, kiu en trimembraĵoj kunigoj de literoj de „aaa“ ĝis „zzz“ kune kun kelkaj ciferoj por la plej necesaj gramatikaj rilatoj, en maniero de sekreta skribado prezentas ĉiujn necesajn ideojn en formo tabela, donas en ĉiu okazo por ĉifraj telegramoj ŝparon de kostoj ĝis 40% en komparo kun vortaj telegramoj en la lingvo germana; sed por lingvo tutmonda, kiel por parolado tiel ankaŭ por skribado, ankaŭ al ĝi mankas la natura fundamento, ĉar eĉ Mezzofanti ne povus teni en la kapo tiujn ĉi kunligojn de literoj, kiuj ankaŭ tie ĉi devas servi anstataŭ vortoj. Al tio ĉi ili estas neelparoleblaj kaj tial por la buŝa interkomprenigado tute ne uzebaj. Ankaŭ la verkado de vortaroj jam en unu lingvo estas ligita kun grandegaj laboroj kaj malfacilaĵoj, ne parolante jam pri kelkaj kaj multaj lingvoj.

(Tie ĉi la aŭtoro finas la historion de la diversaj provoj kaj transiras al la priskribo de la sistemo Volapük, de kiu li en tiu tempo estis ankoraŭ varmega partiano, trovante ĝin la plej bona el ĉiuj ĝis tiam faritaj provoj. Ni jam rakontis [v. No. 10 de „La Esperantisto“ 1890], kiel post la apero de la sistemo „Esperanto“ la aŭtoro forlasis Volapükon kaj transiris kun plena entuziasmo al „Esperanto“, de kiu ĝis la fino de sia vivo li restis varmega batalanto. — Ni devas ankoraŭ aldoni, ke la nun alportita artikolo ne estas plena historio de ĉiuj provoj de lingvo tutmonda; volante skribi nur gazetan artikolon kaj ne dikan detalan verkon, la aŭtoro parolis nur pri parto de la proponitaj sistemoj, kaj ankaŭ pri ĉiuj el tiuj ĉi li diris nur kelkajn vortojn. La efektiva nombro de la diversaj projektoj, faritaj en la lastaj 200 jaroj, estas pli ol 150. — La redakcio).

El Munĥeno ni ricevis la sekvantan leteron:

Munĥen, 3^a Januaro 1891.

Tre estimata Sinjoro!

Per tio ĉi mi Vin sciigas, ke hodiaŭ vespere 3 sinjoroj de nia urbo, kunvenintaj en la loĝejo de l' sinjoro subskribita sub No. 2, fondis klubon esperantistan, la unuan en tiu ĉi urbo. La societano No. 4 ne povis alesti kaŭze aliasociata farado. La kvar societanoj esperas, ke baldaŭ la nombro de la membroj estos multe grandigita. La societanoj alprenis la nomon „Societo Esperantista Munĥen“ kaj komencos senpage instrui publike, korespondi kun aliaj kaj ali landaj Esperantistoj, simple diri: vastigadi la lingvon internacian kun fortaj unuigitaj.

Ĉar la nombro de la societanoj hodiaŭ estas nur tre malgranda, ili ne povas fari jam grandajn paŝojn, tial ili tre multe Vin dankos, se Vi, tre estimata Sinjoro, povus alsendi

al ili ian kolekton da verkoj esperantistaj ĝis nun elirintaj — por fondi kluban libron.

Esperante, ke Vi baldaŭ al ni faros la honoron skribi al ni, la subskribitaj Esperantistoj Vin salutas!

Via tre aldonita

(1) Ludwig Meier,
(ekskapitano, verkisto) Augustenstrasse 89/III, 1.

2) Franz Müller, Barerstrasse 70/I^r.

3) Ludwig Kahn, Frühlingstrasse 14a/I.

4) Herman Ermold, Frauenhoferstrasse 31/I.

La gaja migranto.

Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom'
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon, al la hom'.

De l' montoj riveretoj fluas,
Alaŭdoj kantas super mi,
Mi ankaŭ gajan kanton bruas
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo:
Li zorgas pri la tuta ter',
Li ankaŭ min sur mia vojo
Eterne gardos de danĝer'.

Trad. de Hemza.

Al la reĝo.

Vivu la reĝ' al ni,
Tre longe vivu li!
Gardu lin Di'!
Justa kaj pia reĝ', —
Dio, pro nia preĝ'
Estu kun li.

Forta la reĝa tron',
Ver' estas lia kron',
Glavo la leĝ'.
Kun amo en la kor'
Regas kun granda glori'...
Vivu la reĝ'!

Brulu, o sankta flam'
De la eterna am'
Pro la patruj',
Kaj forte staros ni
Ĉiuj por unu li,
Pro la patruj'.

Longe, ho, restu Vi,
Gloro de la naci',
Sur reĝa seĝ'!
Via plej granda glori'
En la popola kor'.
Vivu la reĝ'! Trad. de Hemza.

La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.

Parto I.

Antaŭ longa, longa tempo — tute egale kiam kaj kie en Anglujo — estis varmega batalo. Oni batalis en longa

somera tago, kiam la ondanta herbo estis verda. Multaj kampaj floroj, kreitaj de la mano de la Plejpotenca por esti odora pokalo por la roso, vidis en tiu tago sian multekoloran kalikon plenigita de saugo kaj mortis en teruro. Multaj insektoj, kiuj havis sian delikatan koloron de senkulpaj folioj kaj vestoj, en tiu tago nove koloriĝis de mortantaj homoj kaj lasis per sia rapidega forkuro nenaturan postesignon. La multekolora papilio sur la rando de siaj flugiloj portis sangon en la aeron. La rivereto havis ruĝan akvon. El la tero disbatita per la piedoj fariĝis marĉo, kie en malpuraj malsekajoj, kiuj sin kolektis en la enbataĵoj de piedoj de homoj kaj hufoj de ĉevaloj, la ĉie superreganta koloro malagrable brilis en la suno.

La ĉielo nin gardu de vido de sceno, kiun la luno vidis sur tiu ĉi loko, kiam ĝi super la nigraj arbaraj dorsoj de la montetoj sin levis sur la horizonto kaj rigardis sur la ebenaĵon, semitan de suprenturnitaj vizaĝoj, kiuj antaŭ nelonge sur brusto patrina ridetis al la okuloj de patrino aŭ trankvile dormetis. La ĉielo nin gardu de la sekretoj, kiujn la vento plena je odoro de mortintaĵo super la ebenaĵo murmuretis pri la laboroj de tiu ĉi tago kaj pri la morto kaj la suferoj de tiu ĉi nokto. Ofte ankoraŭ la silenta luno briladis super tiu ĉi kampo de l' batalo, ofte la steloj malgaje ĝin observadis, ofte la ventoj de ĉiu flanko de l' mondo preterblovdadis super ĝi, antaŭ ol la postesignoj de tiu batalo malaperis.

La signoj restis ankoraŭ longan tempon, sed nur en bagateloj, ĉar la naturo, staranta tre alte super la malbonajn pasiojn de la homo, baldaŭ ree ricevis sian gajecon kaj ridetadis super la kulpa kampo de l' batalo tiel same, kiel antaŭe, kiam la kampo estis ankoraŭ senkulpa. La alaŭdoj kantadis alte super ĝi, la ombroj de la flugantaj nuboj kuradis ludante super la herbejoj kaj arbaroj, super la tegmentoj kaj turoj de la urbo borderita de arboj, rapidante al la brilanta malproksimaĵo, kie la tero kaj ĉielo kuniĝas kaj la vespera ĉielruĝo estingigas. Greno estis semata kaj elkreskadis kaj estis rikoltata; la rivereto, kiu antaŭe estis ruĝe kolorigita, turnadis radon de muelejo; viroj fajfadis post la plugilo; ŝafoj kaj bovoj paŝtigadis sur la herbejo; knaboj kriadis sur la kampoj por fortimigi la birdojn; fumo sin levadis el la kamentuboj; sabataj sonoriloj gaje sonoradis; maljunaj homoj vivadis kaj mortadis; la modestaj kreitaĵoj de la kampo kaj la simplaj floroj de l' arbaro floradis kaj velkadis en la kutima tempo sur la sanga kampo, kie multaj miloj da homoj antaŭe falis en la granda batalo.

Sed en la komenco oni vidadis en la semitaĵo pli mallumajn lokojn, kiujn la homoj rigardadis kun sento de teruro. Jaro post jaro ili revenadis; kaj oni sciis, ke sur tiuj ĉi fruktaj lokoj homoj kaj ĉevaloj kuŝis enterigitaj en senorda amaso kaj bonigis la teron. La kampisto, kiu tie plugadis, timadis la grandajn vermojn, kiuj loĝis tie ĉi en la tero; kaj la garboj, kiujn oni tie rikoltis, en la daŭro de multaj jaroj estis nomataj la garboj batalaj kaj metataj aparte, kaj neniam garbo batala ĉe la festo de rikolto venadis sur la lastan veturilon. Tra longa tempo kun ĉiu farita sulko estis trovata postesigno de la batalo. Longan tempon oni vidadis difektitajn arbojn sur la kampo kaj duone detruitajn barilojn kaj murojn sur la lokoj, kie estis mortiga mana batalado, kaj lokojn forte batitajn per piedoj, kie neniam herbeto volis kreski. Longan tempon ĉiu knabino timis ornamo al si la harojn aŭ la bruston per la plej bela floro de tiu ĉi kampo de l' mortintoj; — kaj longan tempon oni kredis, ke la tie kreskantaj beroj lasas post si en la mano, kiu ilin deŝiras, neforigeblan makulon.

Sed la jaroj, kvankam ili pasadis tiel rapide, kiel la nuboj de somero, per sia irado malaperigadis ĉe tiujn ĉi postesignojn de la malnova batalo kaj elviŝis la legendajn rememorojn de ĝi el la kapo de la homoj, ĝis ili akceptis la formon de fabeloj de maljunaj virinoj kaj kun ĉiu jaro estis

pli forgesataj. Kie la sovaĝaj floroj kaj beroj restis tiel longe ne deŝirataj, tie nun staris ĝardenoj kaj domoj, kaj infanoj ludadis militon sur la herbo. La vunditaj arboj jam longe estis forbruligitaj. La mallume verdaj lokoj estis ne pli freŝej, ol la memoro pri tiuj, kiuj kuŝis enterigitaj sub ili. Ĉiam ankoraŭ la plugilo alportadis de tempo al tempo pecojn da ĵusta fero, sed estis malfacile rekoni, por kio ĝi servis, kaj la trovantoj meditadis kaj disputadis pri tio ĉi. Malnova nigra kiraso kaj kasko tiel longe pendis en la preĝejo, ke tiu sama malforta duone blinda maljunulo, kiu nun vane penadis ilin rekoni supre sur la blanka arkaĵo, jam kiel infano kun mirego ilin rigardadis. Se la militistaro mortigita sur la kampo de l' batalo povus por unu momento sin levi en la formo, kiel ĉiu falis, kaj sur la loko, kie li trovis la morton, tiam fenditaj kranioj en centoj enrigardus en la pordojn kaj fenestrojn de la dometoj, aperus ĉirkaŭ la paca kameno, estus amasigitaj en la grenejoj, levus sin inter la infano en la lulilo kaj ĝia flegantino kaj digus la rivereton, volvus sin ĉirkaŭ la rado de l' muelejo, plenigus la ĝardenon kaj la herbejon, kaj la amason da fojno ili alte levus per mortantoj. Tiel ŝanĝita estis la loko, kie multaj miloj da homoj falis en la granda batalo.

Eble nenie en la ĉirkaŭ cent jaroj la loko estis pli ŝanĝita, ol en unu malgranda frukta ĝardeno post malnova ŝtona domo kun longa laŭbo antaŭ la pordo. Tie en unu bela mateno de aŭtuno estis aŭdata muziko kaj sincera ridado, kaj du knabinoj gaje dancadis sur la herbo, dum kvin-ses vilaĝaj virinoj staris sur ŝtuparoj kaj deŝiradis pomojn de la arboj, sed de tempo al tempo haltadis en sia laboro kaj rigardadis al la gajulinoj. Ĝi estis ĉarma, natura vido; bela tago, trankvila loko; kaj la du knabinoj dancadis kun kora ĝojo tute gaje kaj senĝene.

Se en la mondo neniu volus brili — tio ĉi estas mia opinio, kaj mi pensas, Vi konsentus kun mi — ni multe pli bone vivus kaj multe pli nin amuzadus reciproke. Estis tre agrable rigardi, kiel la du knabinoj dancadis. Ili havis neniu rigardantojn ekster la pomŝrantaj virinoj sur la ŝtuparoj. Estis al ili tre agrable plaĉi al la virinoj, sed ili dancadis pro sia propra plezuro (almenaŭ tiel oni devis kredi); kaj estis malfacile deteni sin de admiro, tiel same kiel ili ne povis sin deteni de la dancado. Kaj kiel ili dancadis! Ne kiel dancistinoj teatraj. Tute ne! Kaj ne kiel la bonegaj lernantinoj de sinjorino Tiu-kaj-tiu. Neniel! Ĝi ne estis kadriilo, ne menueto kaj ĉe ne simpla anglezeto. Ĝi estis nek laŭ la malnova stilo, nek laŭ la nova, nek laŭ la franca, nek laŭ la angla stilo; pli ĝuste okaze iom en la stilo hispana, kiu, kiel oni diras, estas stilo libera kaj vigla kaj de la frapantaj kantanetoj ricevas iom la karakteron de rava improvizado. Dum ili dancadis sub la fruktaj arboj kaj flugetadis en la ĝardeno supren kaj malsupren kaj turnadis sin reciproke en rondo, la influo de ilia acra moviĝado ŝajne disvastigadis sin plue en la suna gaja ĉirkaŭaĵo, kiel ĉiam pli grandigantu rondo en la akvo. Iliaj flugantaj haroj kaj vestoj, la elasta herbo sub iliaj piedoj, la branĉoj, kiuj sin balancadis en la vento de l' mateno, la brilantaj folioj kaj iliaj tremantaj ombroj sur la suka verda tero, la balzama venteto, kiu blovdadis kaj ĝoje turnadis la malproksimajn ventajn muelilojn — ĉio inter la ambaŭ knabinoj kaj sur la malproksima altaĵo pluganta kampisto, kiu estis vidata sur la horizonto, kvazaŭ li starus en la fino de l' mondo — ŝajne ankaŭ dancadis.

Fine la pli juna de la dancantaj fratinoj sin ĵetis malfacile spirante kaj gaje ridante sur benkon, por ekriposi. La dua sin apogis al arbo apude. La muzikantoj, harpo kaj violono, finis per plena akordo, kvazaŭ fanfaronante per sia vigleco, kvankam la muziko efektive estis tiel rapida kaj tiel pene konkuradis kun la dancado, ke ĝi ĉe unu minuton pli ne povus elteni. La virinoj, kiuj deŝiradis pomojn sur la

ŝtuparoj, ekmurmuris aprobante kaj denove komencis fervore laboradi kiel abeloj.

Eble tial ilia fervoro ankoraŭ pligrandiĝis, ĉar ne juna sinjoro, doktoro Jeddler en propra persono — Vi devas scii, ke ĝi estis la domo kaj ĝardeno de doktoro Jeddler kaj la du knabinoj estis la filinoj de doktoro Jeddler — elvenis, por vidi, kio fariĝas, kaj kiu al la diablo sur lia propra tero faras muzikon antaŭ la manĝo de l' mateno. Ĉar la doktoro Jeddler estis granda filozofa kaj ne tre muzikema.

„Muziko kaj dancado hodiaŭ!“ diris la doktoro al si mem kaj mirante haltis. „Mi pensis, ke ili timas la hodiaŭan tagon. Sed ĝi estas mondo plena je malajoj. Sed Grace, sed Marion!“ li aldonis pli laŭte, „ĉu la mondo hodiaŭ matene estas pli freneza ol ordinare?“

„Se ĝi tiel estus, estu tiun ĉi fojon iom malsevera“, respondis al li la pli juna filino Marion, alirante al li kaj rigardante al li en la vizaĝon, „ĉar hodiaŭ estas ies tago de naskiĝo“.

„Ies tago de naskiĝo, mia kateto?“ diris la doktoro. „Ĉu vi ne scias, ke ĉiun tagon estas ies tago de naskiĝo? Ĉu vi ne scias, kiom multe da novuloj ĉiun minuton komencas la strangan kaj ridindan aferon — ha, ha, ha! oni tute ne povas paroli pri ĝi serioze — kiun oni nomas la vivo?“

„Ne, patro!“

„Kompreneble vi ne; vi estas virino — preskaŭ“, diris la doktoro. „Cetera“, li aldonis kaj rigardis en la belan vizaĝon, kiu sin tiris al la lia, „mi pensas, ke ĝi estas via tago de naskiĝo“.

„Kio! Efektive, mia patro?“ ekkriis lia amata filino kaj donis al li la lipojn por kiso.

„Jen havu! kaj ankaŭ mian amon“, diris la doktoro kaj kisis ŝin; „kaj tiu ĉi tago ofte, tre ofte revenadu — kia penso! La penso deziri oftan ripetadon en tia farso“, diris la doktoro por si mem, „estas bona! Ha, ha, ha!“

La doktoro Jeddler estis, kiel la leganto jam scias, granda filozofa; kaj la ĉefa tezo de lia filozofio estis rigardi la tutan mondon kiel grandega farso, kiel io tro senseca, por ke prudenta homo povu serioze pensi pri ĝi. Tiu ĉi dogmo estis en sia komenco rezultato de la kampo de l' batalo, sur kiu li loĝis, kiel Vi baldaŭ sciigos.

„Kiel propre venis al Vi la muziko?“ demandis la doktoro. „Kompreneble ĝi estas ŝtelistoj de kokoj. De kie venis la muzikantoj?“

„Alfred ilin alsendis“, respondis lia filino Grace kaj rec alfortikigis kelkajn simplajn florojn, per kiuj ŝi antaŭe ornamis la barojn de sia fratino kaj kiujn la dancado malfortikigis.

„Tiel Alfred alsendis la muzikon?“ rediris la doktoro.

„Jes, li renkontis ilin en la vojo, kiam li matene venis. Tiuj ĉi homoj migras per piedo kaj tiun ĉi nokton ripozis en la urbo; kaj ĉar hodiaŭ estas la tago de naskiĝo de Marion kaj li pensis, ke li faros al ŝi plezuron, li alsendis ilin tien ĉi kun bileto, en kiu estis skribite, ke, se mi ĝin aprobas, ili alportu al ŝi serenadon.“

„Jes, jes“ diris la doktoro, „li ĉiam demandas vian opinion“.

„Kaj ĉar mia opinio sin montris favora“, gaje diris Grace kaj haltis por momento, por admiri la ĉarman kapon, kiun ŝi ornamis; „kaj ĉar Marion estis tre gaja kaj komencis danci, ni fine dancis ambaŭ sub la muziko de Alfred, ĝis ni perdis la spiradon. Kaj la muziko plaĉis al ni tiom pli, ke Alfred ĝin sendis. Ne vere, kara Marion?“

„Ho, mi ne scias, Grace. Kiel vi min turmentas kun Alfred!“

„Mi vin turmentas, kiam mi parolas pri via amanto!“ diris ŝia fratino.

„Tion ĉi mi scias, ke estas por mi sufiĉe indiferente, ĉu oni parolas pri li aŭ ne“, diris la malgranda koketulino,

disŝirante kelkajn florojn, kiujn ŝi havis en la mano kaj disĵetante la foliojn sur la tero. Preskaŭ jam tediis al mi aŭdadi pri li; kaj se vi diras, ke li estas mia amanto —“

„Silentu! Ne parolu tiel malsate pri fidela koro, kiu tute apartenas al vi, Marion“, ekkriis ŝia fratino — „ĉe ne se vi ĉerčas. Estas neniu pli fidela koro en la mondo ol Alfred!“

„Ne, ne!“ diris Marion kaj levis siajn brovojn kun komika mieno de pasanta meditado — „eble ne. Sed mi ne scias, ĉu tio ĉi estas granda merito. Mi — mi propre tute ne volus, ke li estu tiel fidela. Mi neniam vigligis lin al tio ĉi. Se li pensas, ke mi — Sed, kara Marion, kial ni devas nun paroli ĝuste pri li?“

Estis io tre agrabla vidi la du ĉarmajn figurojn de la florantaj fratinoj, kiuj, alapogitaj unu al la dua, promenadis sub la arboj kaj paroladis inter si, seriozeco kontraŭ la facila gajeco, sed amo kore respondante al amo. Kaj estis sufiĉe strange, ke en la okuloj de la pli juna fratino naĝis larmo kaj io profunde kaj kore sentata briletis tra la petolajo de ŝiaj vortoj kaj pene kun ĝi batalis.

La diferenco en la aĝo de la ambaŭ knabinoj povis esti ne pli ol kvar jaroj. Sed Grace, kiel ofte en tiaj okazoj, kio ne estas patrino, zorganta pri la ambaŭ (la edzino de la doktoro mortis), en la zorganta amo al ŝia pli juna fratino ŝajnis pli maljuna, ol ŝi estis; kaj laŭ la naturo de ĉia partoprenado ŝi ŝajnis — ekster kunsentanta amo — al ŝia petola humoro pli malproksima, ol oni povus pensi juĝante laŭ ŝiaj jaroj. Alta patrino alvokiĝo, kiu eĉ en tiu ĉi sia refigurajo purigas la koron kaj la sanktigitan animon faras pli proksima al anĝeloj!

La animo de la doktoro, dum li rigardadis kaj aŭskultadis ilin, sin okupadis en la komenco nur je diversaj gajaj pensoj pri la malsaĝeco ion ami kaj sopiri, pri la senseca revo, per kiu junaj koroj blindigas sin mem, se ili unu momenton pensas, ke estas io serioza en tia sapa veziko, kiel la amo, ĝis ili fine vidas, ke ili estas trompitaĵ, kio venas preskaŭ ĉiam.

Sed la senpretenda memoferanta esteco de lia pli maljuna filino, ŝia kvieta karaktero, kiu tamen estis ligita kun tiom da konstanteco kaj freŝeco, ĉiam, en kontrasto inter la trankvila kvieta figuro de tiu ĉi kaj la brilanta beleco de lia pli juna filino, revenadis al li al la okuloj; kaj pro ŝi li bedaŭris, ke la vivo estas tiel ridinda afero.

Al la doktoro neniam venis en la kapon demandi, ĉu liaj infanoj iel penas fari el ĝi aferon seriozan. Sed por tio ĉi li estis filozofa. Estante de naturo homo kun mola kaj varma koro, li per okazo venis al tiu ordinara ŝtono de la saĝuloj (multe pli facile trovebla ol tiu, kiun serĉas la alĥemiistoj), kiu ofte fariĝas falilo por bonkoraj homoj kaj havas la malagrablan econ, ke ĝi turnas oron en malpuran fandajon kaj ĉiun multekostan objekton en ion tute senutilan.

„Britain!“ ekkriis la doktoro. „Britain! Kie vi estas?“ Malgranda homo kun eksterordinare malafabla kaj malkontenta vizaĝo elvenis el la domo kaj respondis tiun ĉi vokon iom senĝene per la vortoj: „nu, kio do estas?“

„Kie estas la tablo matenmanĝa?“ demandis la doktoro.

„En la domo“, respondis Britain.

„Ĉu vi kovros ĝin tie ĉi sub malkovrita ĉielo, kiel mi ordonis al vi hieraŭ vespere?“ diris la doktoro. „Ĉu vi ne scias, ke venos gastoj? Ke, antaŭ ol venos la vojaĝa kaleŝo, tie ĉi ankoraŭ negocoj devas esti finitaj? Ke hodiaŭ estas precipe solena tago?“

„Ĉu mi povis ion fari, sinjoro doktoro, antaŭ ol la virinoj deŝiris la pomojn, he?“ diris Britain kaj levadis iom post iom sian voĉon, tiel ke li fine forme kriis.

„Nu, ĉu ili nun jam finis?“ diris la doktoro kaj rigardis la horloĝon. „Antaŭen! faru rapide! kie estas Clemency?“

„Jen mi estas, sinjoro“, ekonis la voko, venante de unu el la ŝtuparoj, sur kiu paro da mallertaj piedoj rapide deiradis malsupren. „Ni estas pretaj. Forportu, knabinoj! En duono da minuto ĉio estos en ordo, sinjoro!“

Kun tiuj ĉi vortoj ŝi komencis vive labori kaj montris sin ĉe tio ĉi en tia stranga formo, ke ŝi meritas esti priskribita per kelkaj vortoj.

Ŝi havis la aĝon de ĉirkaŭ tridek jaroj kaj havis sufiĉe dikvangan kaj afablan vizaĝon, kvankam ĝi penis havi esprimon de seriozeco, kiu donis al ĝi vidon tre ridindan. Sed la impresado de tio ĉi ankoraŭ tute malaperadis antaŭ la impresado de ŝia eksterordinare mallerta esteco. Se ni diros, ke ŝi havis du maldekstrajn piedojn kaj du brakojn, kiuj propre apartenis al iu alia, kaj ke tiuj ĉi kvar membroj ŝajnis elartikigitaj kaj tute ne realmetitaj al sia ĝusta loko, tiam ni prezentos nur la veran staton en ĝia plej facila lumo. Kaj se ni diros, ke je tiu ĉi stato ĉi estis tute kontenta, penis siajn brakojn kaj piedojn tiel, kiel ili estis, kaj metadis nenian bridon al iliaj kapricoj, tiam ni donos nur malgrandan ideon pri ŝia trankvilanimeco. Ŝia kostumo konsistis el paro da grandegaj kapricaj ŝuoj, kiuj ĉiam direktadis sin alie ol ŝiaj piedoj, el bluaj ŝtrumpoj kaj el multekolora katuna vesto de la plej malbela modelo, kiun oni nur povus trovi por mono, kaj el blanka antaŭtuko. Ŝi portis ĉiam mallongajn manikojn kaj havis ĉiam kontuzitajn kubutojn kaj tiel vive zorgis pri ili, ke ŝi ĉiam penadis en ĉia situacio, ĉe kie estis absolute neeble, ilin turnadi kaj ĉirkaŭrigardadi. Ordinare malgranda ĉapeto sidis ie sur ŝia kapo, kvankam oni ĝin nur malofte povis vidi sur tiu loko, kiun tiu ĉi vestaĵo pleje okupas ĉe aliaj homoj; sed de la kapo ĝis la piedoj ĝi estis modele pura kaj prezentis ian specon de mallerta puremeco.

(Daŭrigo venos.)

Novajoj.

En la lasta monato la sekvantaj gazetoj donis artikolojn pri nia afero: „Kurjer Warszawski“ No. 352 (pri la traduko de la „Vojevodo“); „Aschaffenburger Zeitung“, „Frankfurter Zeitung“, „Augsburger Abend-Zeitung“, „Münchener Neueste Nachrichten“, „Münchener Tageblatt“, „Wiener Freie Presse“, „Passauer Zeitung“, „Regensburger Zeitung“, „Olmützer Zeitung“, „Wiesbadener Beobachter“, kaj „Nürnberg General-Anzeiger“. Ekzemplerojn de la nomitaj germanaj gazetoj ni bedaŭrinde en la manon ne ricevis kaj ne povas tiel signi la numerojn; la objekto de la artikoloj en ili ĉiuj estis la publika parolado de sinjoro Chr. Schmidt en la Nurnberga societo „Merkur“.

* * *

Lernolibrojn en la lasta monato venigis: s-ro C. Hübert el Aleksandrowsk 25 lernolibrojn (25 ekz. No. 41); inĝeniero W. Brzozowski el Murom 10 lern. (10 ekz. No. 2); s-ro Ŝatunowski el Volĉinec (poŝto Briĉani) 25 lern. (25 ekz. No. 41); s-ro A. Grabowski el Ivanovo-Voznesensk 26 lern. (25 ekz. No. 41 kaj 1 ekz. No. 24); s-ro J. Puĉkovski el Kjahta 75 lern. (45 ekz. No. 41 kaj 30 ekz. No. 1); s-ro V. Kravecov el Boguĉar 10 lern. (10 ekz. No. 41); s-ro A. Sirotin el Kiev 25 lern. (25 ekz. No. 41); doktoro W. Abolenski el S. Peterburgo 65 lern. (65 ekz. No. 41).

Respondoj al la amikoj.

Al s-ro R—d. La diferenco inter „kiu“, „tiu“ k. c. kaj „kia“, „tia“ k. c. estas sekvanta: la formoj kun „u“ estas puraj pronomoj kaj la formoj kun „a“ estas pronomaj adjektivoj signifantaj econ. „Kia“ =

„kian econ havanta“ k. c. Al la vorto „kiu“ Vi povas respondi per substantivo, dum al la vorto „kia“ Vi devas respondi per adjektivo. Ekzemple: je la demando „kiu domo“ Vi respondas: „tiu domo“ (jenes Haus), „tiu ĉi domo“, „la domo de la patro“ k. c.; sed je la demando „kia domo“ Vi respondas: „tia domo“ (ein solches Haus), „tia domo kiel mia“, „alta domo“, „longa domo“, „bela domo“ k. c.

Al s-ro R—r. Vane Vi timas, ke ni volas enkonduki novan ortografion („h“ anstataŭ signeto superlitera). La fina leĝo por nia ortografio estos: „por unu sono unu litero“; kaj kiam ni nur povos, ni ĉiam uzados „ĉ“ anstataŭ „ch“ (povas nur esti, ke iom poste, por pli oportunigi la skribadon, ni donos al tiu ĉi litero pli simplan formon). La skribado de unu sono per du literoj estas tute ne logika kaj neniam povus esti aprobata; sed ni ĝin uzas nur kiel necesan unuatempan rimedon por doni al ĉiuj presejoj kaj al la telegrafo la eblon labori jam nun en nia lingvo. Sed kiam iom post iom la plej granda parto de la presejoj kaj telegrafejoj proviziĝos je nia alfabeto, tiam la uzado de superflua „h“ estos absolute ĉesigita. Ne la „ĉ“ estas transira ŝtupo al „ch“, sed en la „ch“ ni proponis transiran ŝtupon al „ĉ“, kiam ni vidis, ke la absoluta enkonduko de „ĉ“ estas ankoraŭ teĥnike ne oportuna. Tute vere Vi diras, ke la presejoj kaj telegrafoj devas sin konformigi je la lingvo, kiun ili uzas, kaj ne la lingvo je ili; sed nia lingvo estas ankoraŭ juna kaj nepotenca kaj devas sin fleksi, se ĝi ne volas pereci. Ne estas ankoraŭ tempo diri fiere al ĉiuj presistoj: „se vi ne volas vin konformigi je ni, ni vin ne bezonas!“ La unuatempa permeso presi per „h“ estas necesa rimedo por ne fari ofte la presadon de ia verko tute ne ebla aŭ tro multekosta; sed kiu nur havas la eblon presi per signetoj superliteraj, tiu ĉiam devas ĝin fari.

Al s-ro L. en Vilno. En la verkoj, kiujn la aŭtoroj eldonas je sia propra kalkulo kaj respondecas, ili povas uzi tian stilon, kian ili mem volas aŭ kiun ili trovas la plej bona; tial, dezirante eldoni la fablojn de Ezopo, Vi povas en ili la artikolon tute ne uzi; multaj el niaj amikoj estas kontraŭ la artikolo kaj plene aprobas Vian elĵetadon de la artikolo, kvankam ni mem praktike venis al la konvinko, ke la esprimeco, kiun la artikolo donas al la stilo, pli ol sufiĉe kovras la neoportunecon, kiun ĝia uzado prezentas al kelkaj popoloj. En principo ni ne estas kontraŭ plena libereco de la stilo; sed konsiderante, ke nia afero estas ankoraŭ tiel juna kaj neforta, ke manko de la plej severa unueco en la unua tempo povas ĝin meti en tian danĝeron, kiun ne egalpezos ĉe la plej bonaj ennovaĵoj, — ni estus pli kontentaj, se en la unua tempo deflankiĝoj de la nun ekzistanta stilo estus farataj malofte, malrapide kaj nur en okazoj de efektiva bezono kaj ne pli frue ol pri la komuna karaktero de la fareblaj ŝanĝoj estos sufiĉe parolita en nia gazeto. Kelkaj senpaciencaj amikoj eble trovos tiun ĉi vojon tro malrapida, sed „ĉi va piano va sano“.

Malfeliĉa okazo en la presejo antaŭ la eliro de nia januaro numero kaŭzis, ke parto de tiu numero en rapideco estis presita sen mia persona korektado. Tial la legantoj pardonu al ni la erarojn, kiujn ili trovis en kelkaj artikoloj de la dirita numero.

L. Zamenhof.

Anoncoj.

Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,
kiuj eliris ĝis Februaro 1891.

- | № | Nomo de l' verko: | Kosto: |
|-----|---|------------|
| 1. | D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predi-slovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa) | 15 kopekoj |
| 2. | — Język Międzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola) | 15 kop. |
| 3. | — Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca) | 20 kop. |
| 4. | — Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana) | 20 kop. |
| 5. | R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla) | 20 kop. |
| 6. | D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj | 3 kop. |
| 7. | — por Poloj | 3 kop. |
| 8. | — por Francoj | 3 kop. |
| 9. | — por Germanoj | 3 kop. |
| 10. | — por Angloj | 3 kop. |
| 11. | D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto) | 25 kop. |
| 12. | D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto) | 10 kop. |
| 13. | Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea) | 20 kop. |
| 14. | A. Grabowski. La Neĝa Blovado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto) | 15 kop. |
| 15. | L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto | 50 kop. |
| 16. | N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“ | 25 kop. |
| 17. | D-ro Esperanto. Plena vortaro rusa-internacia | 1 rublo. |
| 18. | N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua libro“ | 10 kop. |
| 19. | A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto) | 15 kop. |
| 20. | L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia | 25 kop. |
| 21. | D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana | 25 kop. |
| 22. | Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator | 50 kop. |
| 23. | Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana | 20 kop. |
| 24. | G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's Internationelt Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda) | 20 kop. |

- | | | |
|-----|--|---------|
| 25. | A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget | 25 kop. |
| 26. | E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana | 3 kop. |
| 27. | G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda | 3 kop. |
| 28. | Klubo Nurnberga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberg Weltsprache-Verein | 25 kop. |
| 29. | R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch) | 60 kop. |
| 30. | Kolekto da novaj verkoj (en Esperanto), kajero No. 1 | 25 kop. |
| 31. | Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1 | 10 kop. |
| 32. | Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-rumana | 3 kop. |
| 33. | Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana) | 25 kop. |
| 34. | M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara) | 50 kop. |
| 35. | Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala) | 25 kop. |
| 36. | J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperant (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Ildono hispana) | 25 kop. |
| 37. | A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto) | 30 kop. |
| 38. | A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita) | |
| 39. | Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinardni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema) | 25 kop. |
| 40. | D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta) | 20 kop. |
| 41. | L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj) | 10 kop. |

Ĉiuj supre diritaj verkoj povas esti ricevataj de **L. Zamenhof** (Varsovio, str. Nowolipki No. 21) aŭ de la librejo **Heerdegen-Barbeck en Nürnberg**.

G. Zechmeyer en Nürnberg.

Plej granda komerco de signoj de poŝto.
Ĉiuj kasitaj signoj de poŝto estas aĉetataj kaj ŝanĝataj.
Alle gebrauchten Briefmarken werden gekauft und umgetauscht.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata, rekomendas sin por ĉiuj presaj laboroj.